Tra malfermita fenestro
(Nyitott ablakon át)

Tra malfermita fenestro
singarde venis en mian chambron
la silento.
Kashis sin en anguloj, inter libroj,
en vastaj ventroj de malnovaj vazoj.
Tiam per sia arghenteca, malvarma lumo
salutis min la luno -
mia maljuna amiko.
Paghojn de mia malfemita libro
lante trafoliumis ,
ripozadis, atingante bildojn .
Elprenis la plumon el mia mano.
Ni interparolu - ghi diris.
Kaj ni parolis tra la tuta nokto,
dum l'auroro
per sia orflava hararo
forkovris ghin fine.
Denove ighis taglumo
- brilega, homplena, lauta -
kaj ghiaj lumoj alkrochighis
al freshaj sulkoj de mia vizagho.

Tradukita de János Ruff